



Suplemento
de
La Juna Penso - F 47340 Laroque Timbaut
Dec. 1973 - nº 95 B

Ho, dioj! estas UNU DIO!

(Victor HUGO . La Gigantulo.)

# Jen la Dio!

25/9/72

o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o

Mi eliĝis el profunda tomba dormo
Dum aglego min kunportis en flugŝtormo,
Kaj doloris miaj ŝultroj difektitaj
De malmolaj la kroĉfingroj trapikitaj.
Panikeme mi plorĝemis pro la fato,
Kiu tiel min plubakis sen kompato:
"Ĉu ne povos iun tagon mi trankvile
Finripozi ol suferi senutile,
Por, kun korpo ĉiam pli kadukiĝinta,
Vane spiti al fisorto labirinta?
Kial do bezonis mi pri Ver' klopodi,
Ve! anstataŭ min al dogmoj akomodi,
Kaj sur Tero ĝui veran homan vivon
Ol senĉese sperti nigran perspektivon?"
Sed rapide, plene, mi rekonsciiĝis;
Ŝancelema mia volo malvertiĝis,
Min admonis: "Kial bleki kun malĝojo?
Ĉu vi iam ne elektis pri la Vojo,
Mem, libere, kun konfido al la Vero,
Kaj al Dio? Kial tia malespero?
Nun pluplenumiĝas via evoluo:
Digne ĝin elportu sen konsternopluo!
Ne plu decas dubi pri Di-providenco
Kaj pri la ĉe-fina via rekompenco;
Agu vere inicite: vin memhelpu!
Vi ne estas hund' senmastra: ne ĝemjelpu!
Sed prefere uzu vian homracion
Por superi venke la situacion!"
Ĉu protesti? Pli utilas ion fari...
Kaj, unue, la doloron al mi ŝpari.
Tuj, per manoj, provas mi, kun movoj lantaj,
Ĝisatingi al ungegoj min ŝirantaj,
Kaj, similaj al ferstangoj, la tibiojn
Mi finkaptas spite akrajn komociojn.
Nun mi tiras por kompensi mian pezon,
Kaj profitas aprezindan anestezon.
La afero senkonteste pli bonstatas,
Kvankam certe mi pendole ne beatas.
"Aĥo" ŝajnaprobe raŭkas la aglego

Tiel nigra, kiel vera frugilego,
Kies ungoj malpli preme nun min tenas,
Eksentinte, ke min teni mi mem penas,
Dum li kugle plurapidas en sunhelo
Al fuĝanta l'horizonto de l'ĉielo.
Sed necesas, ke finiĝu la vojaĝo,
Por, ĉe celo, tro ne sperti da domaĝo;
Ĉar la brakoj eklaciĝas kun rapido
Pro l'insida kaj konstanta flugtrepido.
"Aĥo" nun averte raùkas la aglego,
Transflugante super blanka nubogrego
Al miriga montosupro plej giganta
Aperinta, kiel maso brilianta,
Kie staras grandiozaj kapitoloj,
Kun brilegaj aùreolaj orkupoloj,
Kaj internaj rave buntaj florĝardenoj,
Kun kristalaj akvoŝprucoj en basenoj,
Kaj aleoj blankaj, kie homoj nudaj
Promenadas, ŝajne sen kromzorgoj prudaj.
"Aĥo!" triafoje raùkas la aglego,
Kaj instinkte mi streĉiĝas pro memrego,
Ĉar subite li malzomas al teraso
De l'plej granda kapitolo...sen frakaso!
Tuj li tie min deponas sen atendi,
Kaj mi ĝuas la plezuron ne plu pendi,
Kiu min alfluas, kiel tajdinundo,
Kiam staras mi denove sur la grundo,
Kaj ferstangajn la tibiojn ekmaltenas
Dum la aglo forflugante alten penas:
Tion mi supozas, ĉar, de la kastelo,
Jam ne eblas lin pluvidi en ĉielo.
Kaj frotante miajn ŝultrojn mi rigardas;
Sed l'ekvido ĉirkaùaĵa min ponardas:
Kie estas la edena panoramo
Ŝajnanonco de plej bela vivprogramo?
Eble aliflanke de la alta muro,
Trans la fera pordo de ĉi tiu turo.
Ĉar mi staras sur plataĵo de perono
Dekokŝtupa, nuda kiel bastiono,
Inter la fermita pordo de l'kastelo,
Kaj la ondoj de homara la Babelo
Alkurantaj el la limo horizonta,
Por rompiĝi sur la rifa baro fronta
De la fortoj konformistaj de l'socio,

Blindaj la zelotoj de la tradicio,
Kies tasko estas bari al aliaj
Sciovojojn per procedoj eĉ plej fiaj,
Por certigi al fimastroj nur despotaj
La triumfon de konceptoj idiotaj,
Kaj regadon de l'tutmonda sociordo
Per militoj kaj disiga malkonkordo.
Ĉiuj fajre deĵoradas sen stimuloj:
Oficialuloj kaj paraleluloj;
Strangaj entoj kun homkapoj duvizaĝaj,
Aspektantaj iel, kiel nur miraĝaj,
Kaj ne distingiĝas de l'aliaj homoj,
Kvankam ili al mi ŝajnas nur fantomoj;
Ĉar, pro mia surperona novsituo,
Videbliĝas klare ĉia substituo,
Kaj mastrado, per trompado, de l'popoloj,
Kiuj vane frontas dirojn de fiskoloj,
Ne trovante enirejon al la Vero,
Kaj finkraŝas en elano sen espero,
Al la fronto segilklinge ordigita
De l'taĉmento senindulge rife spita;
Kaj se transen saltas ondo pli impeta,
Ĝin tuj zorgas l'ariero ĉiam preta.
Vigle batas la ondaro oceana,
Sed atingo al perono ŝajnas vana.
Kaj mi miras, ke neniu min forpelas
De ĉi-loko, kien ĉiuj vane celas.
Al mi ŝajnas, ke tabua estas limo
Ne transebla ĉe perona la proksimo.
Fakte, ĉiuj tie haltas en amaso,
Kaj al mi rigardas kun ŝajnembaraso:
Kiel tien "li" alvenis? Jen problemo!
Ĉu transpasi? Ĉu lin lasi? Jen dilemo!
Dum momento mi ekspertas maltrankvilon,
Kaj denove pene spitas atrabilon;
Sed l'afero finsolviĝas pro ordono
Ne transpasi tabullimon ĉe l'perono,
Kaj tuj ĉiuj retroiras en akordo,
Dum serene mi min turnas al la pordo:
Duklapega kvadrataĵo hermetika,
Ĝi aspektas elrevige tre fortika;
Kunnitaĵo de fertraboj ja enormaj,
Kun stampite ladkvadratoj iksoformaj,
(Po klapego dek stampitaj ladkvadratoj)

Sen seruro, nek movilaj aparatoj;
Malalloga kiel pordo de prizono,
Kun surskribo ĉe la supro sen frontono:
"Tien ĉi eniras nur la kapablulој
Batalinte laŭ normalaj la reguloj."
Pene provas mi ĝin tiri, puŝi stulte;
Sed mi feblas, tuj laciĝas senrezulte,
Kaj ĉesigas senutilan baraktadon
Por reiri la peronan esplanadon.
La spektaklo ne ŝanĝiĝis: ĉiuj rolas,
Kaj la ondoj stranden same karakolas.
Sed sporade for sin montras nun eklumo.
Sunaspekta ŝajnrajdanto de l'ondŝaŭmo
Ĝi aperas sur sinsekvaj tri marondoj,
Kaj latentas dekok ondoj en profundoj.
Ĝi denove reaperas pli proksima
Kaj intensa, kvankam ne plu anonima;
Tondre nomoj ekaŭdiĝis en ĉielo:
Mikaelo, Gabrielo, Rafaelo;
Flagris fulmoj, kaj la ondoj, kvazaŭ ŝtorme,
Gigantece ampleksiĝis eksternorme;
Nun l'oreloj, surdiĝintaj pro l'evento,
Jam ektimas la silenton post momento.
Scivoleme mi atendas reaperon
Por kompreni tiun strangan novmisteron.
Mi kalkulas: dekses...deksep...dekok...trafe!
La "lumento" elmergiĝas plej serafe
En aspekto grandioza de lumŝtormo,
Kaj reŝvelas la marondoj ĝis enormo,
Dum ektondras novaj nomoj kun persisto:
Aleksandro, nun Hilelo, kaj jen...Kristo!
Kaj denove kvietiĝas la ondhordo;
Ĝi alkure proksimiĝas al la bordo.
Ĉu finite? Ne! pliŝvelas jam l'ondsfero,
Eklumiĝas ĉe la supro...reapero!
Granda suno nun radias kun impono,
Dum eksonas fama nom' : Napoleono!
Ĝis ĉielo ĝi leviĝas fulmrapide,
Dum momento tie restas gloravide,
Kaj profunde en la ondon remergiĝas,
Dum ĉi tiu sur la strandon malferliĝas
Kraŝe kaj lavange, kun ŝajnfuriozo,
En finala likva falapoteozo.
Dum momento mi blindiĝas pro fosfeno,

Sekve de la ĵusokaza fenomeno.
Nur reakirinte mian vidkapablon,
Mi rimarkas, forĵetita sur la sablon
Kaj lasita de l'forfluo sur la strando,
Homon, kiu rampas al la peronrando.
Lin rimarkis ankaŭ la gvardianaro,
Kiu kuras por repeli lin al maro.
Sed jam estas tro malfrue por ofici
Trans tabua la linio sen mal-lici,
Kaj denove ĉiuj haltas ĉe la limo,
Dum mi helpas al ilia ĵusviktimo.
Por alveni ĉe la supro ni ne tardas,
Kaj tuj tie reciproke nin rigardas:
Nova miro! ĉu spegulo tie rolas?
Ĉu l'imago senkatene plufrivolas?
Mi ne revas...firme staras en realo...
Tamen estas mi ĉi tie en...dualo!
Samstatura, samaspekte plej fidela,
Duoblaĵo mia tie staras ja ĝemela.
Same miras li sen plua embaraso,
Sen klarigpostuloj, nek ridofrakaso.
Ne necesas vortoj: ni jam nin komprenis;
El memoro panoramo fulme jenis; ()
Re-spektado de pasintaj multaj vivoj
Kunspertitaj tra diversaj kolektivoj,
Pro celado al Justeco kaj al Vero,
En la samaj korpo, koro kaj...espero.
Eĉ konsenti pri la sekvo ne utilas:
Ĝin mi konas ja de ĉiam kaj jubilas.
Kvazaŭ altiritaj de magneta forto,
Ni jam pretas al komuna nova sorto.
Niaj brakoj etendiĝas reciproke,
Ĉirkaŭpremas nin tenere, amalvoke;
Kaj denove reokazas la miraklo:
Niaj korpoj kunfandiĝas sen obstaklo.
Dum momento nin ĉirkaŭas nigra nubo,
Kaj ektimas la animo pro inkubo;
Sed jam lumo reaperas sunobrile...
Nun ni estas du en unu plej stabile.
"Mi" alia nune staras surperone,
Kvankam fakte li "ni" estas dupersone.
Kaj profitas tiu "mi" privilegion

() subite ekaperi.

Rejunecan kaj tutfreŝan energion.
Al la pordo mi reiras ja pli fide,
Kaj, streĉante la muskolojn plej decide,
Mi ĝin puŝas, reprovante ĝin malfermi,
Kaj ne miras, kiam ĝi sin movas per mi.
La du grandaj feraj masoj finturniĝas,
Dum pro l'stringa fortostreĉo mi vertiĝas.
Sur la sojlo mi ekpaùzas anhelante,
Kaj normalan reakiras spiron lante,
Dum l'okuloj vane plonĝas kun konsterno
En la densan mallumecon de l'interno.
Sed alkutimiĝas ili tre rapide,
Kaj distingi foren provas plej avide.
Sed maleblas vidi pli ol tre proksime,
Sen penetri pluen sole kaj maltime.
Etendiĝas tie larĝa galerio,
Kun, tajlitaj rekte en rokmaterio,
Altaj krudaj vandoj, aspraj kaj sinistraj,
Kun rebriloj glimaj kaj striegoj bistraj.
La plafona volbo foras en mallumo,
Kaj silento reĝas eĉ sen muŝa zumo.
Decideme, senlucernan la kavernon
Mi eniras, ne havante eĉ lanternon,
Kaj dek metrojn mi apenaù faris paŝe,
Ke fermiĝas la pordego tuj malkraŝe.
En mallumo nun mi staras kaj...atendas,
Kaj instinkte tuj la brakojn eketendas,
Por laùlonge de la vando min direkti,
Sen tro vane pri la sekvo plukonjekti.
Sed jam milda nokta lumo blue fluas
El plafono kaj el vandoj. Mi reĝuas
Vidkapablon tre agrablan, kvankam febla,
Dum aùdiĝas voĉo nete perceptebla:
"Estas Vojo, Vero, Vivo mi, kaj oni
Devas min trapasi por la "Patron" koni.
Estas mi la Morto kaj Ĉiopatrino,
Por la Dia Filo la konvena "Sino".
Al mi venu vi la soifantoj, venu!
Kaj la akvojn de l'eterna Saĝo prenu ."
En mi eĥas kun insisto la alvoko,
Kiu sorĉe min altiras en la roko,
Kvazaù en subtera trajntunelo,
Kiun iluminus steloj de l'ĉielo.
Kaj mi iras al la voĉo alvokanta,

Rekten meze de l'ŝoseo kondukanta,
Por eviti manojn, kiuj kapti provas
Min, kaj el rokfendoj fulme sin elŝovas,
Dum insidaj sonoj, kvazaŭ de kermesoj,
Min ŝancelas per inferaj logagresoj.
Ĉiupaŝe stumblas mi pro novperfido,
Ĝis atingas mi al granda piramido,
Ĉe la centro de rotondo samaskala,
Rokinterna fositaĵo malbanala,
Kies la kupolo ŝajnas subtenata
De la pinto piramida delikata.
Altomeze videbliĝas aperturo,
Enirejo al novspeca aventuro.
Per ŝtuparo ĝi montriĝas atingebla;
Ne facile, sed mi estas nun malfebla,
Kaj komencas eskaladi kun memfido
La deklivan edron de la piramido,
Dum la voĉo min pluvokas el l'interno,
Pli kaj pli insiste, kvazaŭ logguverno.
Spitas mi la altajn ŝtupojn, paŭzas, grimpas,
Glitas, falas, kaj la vestoj...jam malpimpas.
Sed persiste mi progresas kaj altiĝas,
Ne zorgante ĉu mi belas kaj prestiĝas,
Kaj atingas fine al la aperturo,
Kiu de malsupre nur miniaturo
Ŝajnis, sed aspektas vera nun portalo,
Kaj apertas al luksega luma halo,
Trairejo al areo trinivela,
Kaj ampleksa kiel urbo ja Babela.
Tie staras la regantoj de la Mondo,
Kaj revuas nune la jarcentoj-rondo,
Per soldatoj kaj armiloj diversspecaj,
Dum laŭtiĝas laŭdaklamoj tre aprecaj.
Sed pluvokas min la voĉo al la centro,
Kie ĉirkaŭ puto staras en koncentro
La plej gravaj el tutmondaj altranguloj,
Antaŭ kiuj popolestroj estas nuloj;
Ĉar, mem, estroj de la estroj ili estas,
Kaj eonan jubileon ili festas.
Sed ne eblas plurezisti la alvokon,
Kvankam nepre mi tre ŝokos la paroĥon.
Tra l'amaso ĉirkaŭanta mi ŝoviĝas,
Ĝin transpasas, aliflanke retroviĝas
Antaŭ vasta tendumejo akcesora,
Por la reĝoj gastloĝejo provizora,

Memorige pri l'antikva tendofesto
De l'Hebreoj, kiel pia manifesto
Pro l'amara kvardekjara travagado
Tra l'dezerto, kun l'Arkeo en parado,
Sur la "ondoj" de l'tribaro moviĝanta,
Jen flosanta kaj ne mergiĝanta,
Pro l'konstanta zorgo de l'Levida tribo
Deĵoranta laŭ Mosea la preskribo.
Kaj duvice ĉirkaŭstaras gvardianoj,
Laŭaspekte senkomplezaj veteranoj.
Tamen ilin mi aliras plej proksime,
Kaj profitas la momenton por maltime
Kaj surprize ŝteleniri la tendaron,
Kiam ekvidante Nebukanecaron,
Aperanta en iama sia gloro,
Ovacio el la ĉeestantara ĥoro
Ŝtorme flagras, surprizante la gvardion,
Kiu malatentas la ĉirkaŭmedion,
Ŝtelrigardas dum sekundoj la paradon,
Kaj tuj poste pluprizorgas postenadon.
Sed sufiĉis, mi ŝteliris kaj rapidas
Nun tra l'tendoj dum ekkrioj min perfidas:
Servistaro jam alvokas pri ŝtelisto;
Nun mi kuras, malgraŭ krioj, kun persisto,
Finatingas la paradan esplanadon,
Kaj postsekvas defilantan novbrigadon;
Dum momento tie spiras pli trankvile;
Inter du soldatoj paŝas samastile;
Ili ride ekprofitas la amuzon,
Kaj komplice eĉ komplezas mian ruzon.
Sed kun ili ne intencas mi tro iri;
Nun denove povas mi facile spiri.
Mi rimarkis, ke ne staras gvardianoj
Ĉirkaŭ l'centro: For de l'reĝoj la plebanoj!
Kaj kurante, je l'momento oportuna,
Mi rapidas al l'amaso ĉetribuna,
Kaj atingas al la supro, sen avizo,
Profitante ekefikon de l'surprizo,
Per ŝtuparo monumenta, kie flirtas
Ĉieslandaj flagoj. Ŝvitas mi kaj hirtas;
Kun ŝiritaj vestoj jen, sen kromparolo,
Pli aspektas mi Diablo ol Apolo, (o)
Kaj apero mia ĉe l'reĝa kohorto

(o) Apolono.

Naskas klamojn, kiel vulpo en birdkorto.
Furorplenaj reĝvizaĝoj min minacas:
"Kiel tien, vagabondo, vi aŭdacas?!"
Oni min ĉirkaŭas, kvankam ne torturas;
Eble nur pro tio, ke mi tro malpuras.
Sed ordono venas de virina voĉo,
Kaj subite ĉesas la kriodiboĉo.
Malfermiĝas tute la minaca ringo,
Kaj min oni puŝas helpe de spadingo,
Tien, kie tronas imperiestrino,
Kaj al ŝi min ligas tuja korinklino,
Kvankam mi rezistas al kunpuŝo kruda
Stare, sen konsenti al kliniĝo truda.
Sed ŝi tuj mansignas: ĉesas la ekscito,
Kaj al ŝi mi paŝas sekve al invito.
Ŝi tre belas, kun mantelo nokte nigra
Kaj perlosemita: stelbrilado vibra,
Ĉirkaŭite borderita de hermeno
Neĝoblanka, sen butonoj, nek rimeno,
Kiu montras blankan robon transkovrita
De lazura brustrubando akredita.
Krono el smeraldoj, perloj kaj rubenoj
Ŝin ornamas: sumo de multaj hompenoj...
Koliero, kun smeraldo seslatera,
Parte nur sin montras, kvazaŭ solitera,
Kaj smeraldaj orelaĵoj plej rafine
Kompletigas la ornamon malabstine.
Ŝi min alparolas kun severa tono,
Dum mi ŝin admiras sen instigadmono.
Mi maloftan la okazon elprofitas,
Kaj satigi la okulojn ne hezitas.
Ŝiajn vortojn mi perceptas tra vualo,
Dum de l'lipoj min fascinas la koralo;
Sed silento min eltiras el hipnoto,
La paroloj ĉesis: rolas nun la loto!
Man' ĉe brusto kortegane mi kliniĝas,
Laŭ prastilo, kiu en mi pluvestiĝas:
"Imperiestrina Moŝto, eksterpreme
Mi omaĝas vian belon fervoreme,
Kaj vin petas, tiun pruvon de admiro vera,
Ne mistaksi, fontas ĝi el kor' sincera.
Nun al demandoj viaj provos mi respondi,
Kvankam malfacile estas ilin sondi.
Kiu estas mi kaj kion mi ĉi-faras?
Ĉu ne scias mi pri la loko, kie staras

Mi? El kiu lando mi do venas?...Plej koncize
Povus mi respondi ja vin misprecize,
Ke konscia homo estas mi, migranto
Sur la Vojo al la Vero, kaj...sen vanto.
Sed verŝajne tio vin ne kontentigus;
Al detaloj pliaj min vi mem instigus;
Do, prefere estas ĝin deklari nete:
Vane pri mi-scio mi klopodis vete.
Mi ne scias, kio estas mi, do, plue,
Peti min pri tio estas superflue.
Estas mi ĥaoso ja senfundamenta,
Ŝajne unueca sed multelementa;
Estas kosmo mi je homa mezoskalo,
Kaj animo tra osmoza scivualo;
Miliardoj estas mi da galaksiĉeloj,
Mem atomaj miriadoj, ĉelparceloj,
Kiuj fakte estas veraj sunsistemoj
kun planedoj, Tero, homoj kaj...problemoj;
Kaj el tiuj miriadaj miliardoj
Da mi-eroj kun apartaj vivoardoj
Kaj vivdaŭroj, kiuj nevideble svarmas
Trans korplimo kaj rilate al ĝi karmas,
Elmontriĝas nek komenco kaj nek fino
De finita ajna mio - sen obstino -
Sed vortico, kie nodas sin momente
La estinto kaj l'estonto diligente,
En senĉesa flus-malfluso materia,
Kiun movas la spirito memkonscia,
Kies ekzistado elvidiĝas klare
Per stampado materia senkompare.
Se mi provos min difini pli precize,
Mi nur diros, ke mi estas, malsurprize,
Radiado, memaganta energio,
Lumo en mallumo de la materio,
Tempo en la Spaco, kosma ondinvado,
Mova fluo trans la homa korpfasado,
Fonto de imago, volo kaj deziroj,
Kiuj estas karnesencaj la sopiroj
Kaj triobla baz' de l'subkonscio mia,
Fariĝanta per spertado memkonscia.
El nenio, tra vivcikloj kaj eonoj,
Sur la Vojo al la Vero, pro novkonoj,
Mi senĉese paŝas; ĉiam pluen penas;
Al gigantaj taskoj min mi mem katenas,

Sen espero kroma, fariĝinte dio,
Fine nur renesti sinon de l'nenio.
Plej precize, Via Moŝto, jen la homo
Antaŭ vi staranta, sola kaj sen nomo,
Mem Principo de la vivmetamorfozoj
Nun aganta en la lando de la rozoj
Kaj de l'Teraj diej, kvazaŭ ŝton' angula
Antaŭ ĉiu homanimo senskrupula.
Per mi nulo, mallertulo sen diplomoj,
Nepre sin mem juĝas ĉieslandaj homoj,
Ĉe la fino de l'homaraj vivocikloj,
Kosmoskale tempatomaj nur partikloj.
Sed pri tio, kvankam rajtas mi atesti,
Nepre devas vi samrajte mem min testi,
Kaj humile mi konsentos al la morto,
Se misfide mi eraris eĉ per vorto.
- Eĉ per vorto... vi ĝin diris...konsentite!
Nur per vortoj testos vin mi spite.
Tre aŭdacis vi facile per paroloj,
Sed sufiĉas nek aŭdaco, nek kaĵoloj,
Se la testojn ne kapablas vi respondi,
Vi per morto spertos pri aŭdaco frondi. (°)
Kaj montrante la paradan esplanadon
Ĉirkaŭanta trinivelan la estradon,
Ŝi min diras: "Nun respondu senerare
Pri la nomoj de l'areo temerare
De vi transpasita por ĉi tien veni.
- Prirespondi tion povas mi sen peni:
EO, jen la nomo de la esplanado;
GOO estas tiu de l'unua grado;
MOO, tiu de la dua, kaj O, fine
Nom' de l'tria, kie staras ni kulmine.
Mi aldonas, kvankam nur pro konscienco:
Estas nomo de l'ŝtuparo: Pacienco.
- Prave vi respondis la unuan teston;
Per la dua ni daŭrigu tuj la kveston.
Kvankam tio vin ne helpos, mi mencias,
Ke nur altaj plej gravuloj ĝin priscias."
Min montrante globon blue glazuritan,
Kaj per zono diamanta ornamitan,
Dum sur zonduono plia kompletige,
Supre kaj transverse, ankaŭ plej prodige,
Staras kruco same diamantoplena,
Ŝi ordonas kun voĉtono suverena:

(°)frondi: moke malortodokse agi, spiti

"Nun respondu pri la nomo de la Globo!"
Mi mienaŝ al ŝi ride kun aprobo:
"- Ĝin sufiĉe proklamadis la renomo:
Tendumejo-prizorganto jen la nomo."
Kvankam sinregema mire ŝi ekgapis;
La respondo ŝin surprize kvazaŭ frapis.
Nun ŝi min rigardas iom ŝanceliĝe;
Memfidemo ŝia staras jam...vestiĝe.
Sed ŝi refirmiĝas tuj kaj, sen atendi,
Min montrante "Krismon", sen plu rekomendi, (°°)
Al mi spitas: "Vi al tiu lasta testo
Nun respondu per la nomomanifesto!"
Kaj ŝin kompatante diras mi instige:
" - AKASOMO ĤOGAGOMO, mallongige
ĤAMO, jen la nomo, tuta vivprogramo:
Pli ol kvar jarmiloj de l'homara dramo,
Tra l'inferaj flamoj de la "Fajra Lago",
Sur la "Ŝipo" alnomita "TOTAL-GAGo."
Kvankam mi pretiĝis al surprizo ŝia,
Min mirigas la reago...koncesia.
Alten la insignojn de l'supera povo
Levas ŝi subite per decida movo,
Kaj admone ŝi ekkrias kun fervoro:
"- Genuiĝu reĝoj antaŭ la Sinjoro!"
Kaj ŝi, deponinte antaŭ mi l'insignojn,
Genuiĝas spite la ribelajn signojn
El la lastaj reĝaj vicoj, kiuj mire
Ŝin rigardas senkomprene, maladmire,
"Ĉu tutteraj ni potencaj superuloj
Cedi devas al ĉispecaj fipostuloj?"
Sed klarigoj venas de l'unuaj vicoj,
Kaj obeas ĉiuj tuj sen kromnoticoj,
Dum ŝi nune diras: "Jen la Servantino
De l'Sinjoro, laŭ Biblia la difino,
"Li" bonvolu ŝin rigardi kun favoro,
Kaj pardoni ŝin pro ŝia ĵusrigoro."
Ekmomente mi kontemplas la potencon
De la Vero sur la homan konsciencon,
Kiu povas, antaŭ hirta vagabondo,
Klini ĉiujn reĝajn kapojn el tutmondo,
Kaj tuj, sen eĉ pensi ĉu mi eble revas,
Mi la imperiestrinon mem relevas,
Kaj per mano al ŝi premas submentone,

(°°)krismo: speco de iksoforma sceptro.

Ke ŝi rekten min rigardu senadmone.
Ĉar ŝi plene nun honteme konfuziĝas,
Kaj plej rave ekroziĝas, malprestiĝas...
La koralajn lipojn kisus mi volonte,
Dum l'okuloj nun sin fiksas al mi fronte
Kaj insiste, kun invito al...agado.
Sed altiras min alia Eldorado,
Kaj mi diras: "Ne nur bela sed tre saĝa
Estas Moŝto Via, ankaŭ tre kuraĝa,
Sed mi devas pluen iri sur la Vojo;
Mi jam paŭzis tro ĉe vi per unu fojo;
Mia lando estas ne el tiu mondo;
Devas mi transpasi al alia rondo,
Kie homoj tiel same min atendas,
Ĉar de mia sort' ilia findependas.
Ĉu la grundo nepre restu plusterila?
Ĉu la semo mem fariĝu senutila?
Al signita Cel' mi iras per aktivo
Por poluri taskon de antaŭa vivo.
- Nun, Sinjor', Vin mi ne komprenas,
Kvankam certe bonvoleme mi ekpenas.
- Komprenigas bone nur eksperimento;
Memkreado estas konofundamento.
Kiel Dio hom' sin kreas sin farante,
Metiiste, paŝ' post paŝo elkovrante
Leĝojn, celojn kaj ideojn ja aliajn,
Flue memnaskantaj novkonceptojn pliajn.
Kono el analogio nur konsistas;
Per komparo al klariĝo ni persistas;
Konsciiĝo, jen vekiĝo malfacila,
Kaj l'unua krio fin' de dorm' trankvila.
Alvenante vivon, mortas ni al morto,
Por progresi pluen per alia sorto.
Nepre jam signita estas nia vojo;
Forgesitan padon sekvas ni kun ĝojo,
Kaj instinkte rejungiĝas kun obeo
Al la tasko de alia forpaseo.
Tiel homo iĝas saĝa progresive,
Polurante sian verkon viv-post-vive.
Ĉu vi nun komprenas? Mi ne povas halti
Ĝis kun la paseo min mi povos ŝalti,
Ke kurento freŝa tra l'homaro fluu,
Ke socio vere homa sin konstruu.
Min, Sinjoro, vi mem nomis ja plej prave,

Kaj pro tio mi ĉi tie rolas grave,
Ĉar ekfariĝinte nulo pro memvolo,
De l'Nenio nun mi estas la simbolo;
La "Abismo", kie eblas la koncentro
De la kosma radiado ĉe la centro,
Ankaù "Semo", mem de l'korpo disidento,
Kaj sintezo de la korpa spiritento,
Konsistanta el trioblaj du influoj,
Korpa kaj spirita, kun la ses unuoj,
Korpaj: Karno kun ostaro kaj nervaro;
Kaj spiritaj: mens', animo kaj astraro. (°)
Mi revenas ĉe la fino ĉies cikloj,
Plucelanta al aliaj novvehikloj,
Kiujn mi atingas per tri hipostazoj,
Manifestoj lunsimilaj, laù tri fazoj,
De l'influoj "pare" min konsistigantaj
Je la homa skalo, kaj, tra la gigantaj
Flamoj de la "aĝo fera", min purigas,
Dum mi al novvivo ĉiam pluinstigas.
De la ĉela stato al la tuthomara,
De komenco luma al la fin' amara,
De plej atompartikleca dimensio,
Ĝis al tuta kosmoskala ekspansio,
Mi baraktas tra spertmulta festivalo,
Por atingi al la lasta scivualo,
Sen eĉ antaùscii pri la cel' trafenda;
De l'konscio formiĝanta findependa;
Devigita ĉiupaŝe memelekti
Inter multaj novaj vojoj kaj konekti
Tiucele, kaj esplore, spertostampojn;
Plugebligi tiujn novajn konokampojn
De la ĵusa vivo; por, nur en la ĉerko,
Ekkompreni sencon de la propra verko.
Estas mi "l'Unua", ankaù jen la "Lasta":
Kiu min konsilos sur la Vojo Drasta?
Tute mi memstare prielektas vojon
Sen antaùscii ĉu ĝi donos ĝojon.
Ĉar samkiel homo nepre el Nenio,
La naturo dia venas al konscio;
Sed pli malfacile, simple nur pro tio,
Ke ĝi rekte malas al la materio,
Kaj bezonas nepre multe pli da jaroj
Por ne plue dubi pri la homeraroj;

(°)astraro: astralo de la spiritistoj:intera mondo.

Dum l'aliaj homoj ilin opinias
Plej normalaj, kaj tuj ilin komunias.
Sed sufiĉas! nun mi devas pluen iri,
Kvankam al vi certe devos mi sopiri.
- Ĉu neniam plu revenos Vi, Sinjoro?
Ŝi ekflustras...kaj moliĝas mia koro...
- Certe mi revenos...dum alia ciklo."
Kaj mi startas plej rapide, kun kortiklo,
Spite la riproĉojn de l'okuloj nigraj...
Ŝtelkisinte, fine, al la lipoj vibraj.
Nun mi min direktas al la centra puto,
Kiu flamojn vomas per konstanta sputo.
Strangaj flamoj; diafanaj; tro instigaj;
Buntaj kiel florĝardeno kaj...frostigaj.
Sed la Voĉo daŭre vokas: "Venu! venu!"
Mi do spitu kaj maltime mi eltenu.
Sur la randon mi alsaltas...ekatendas...
Nu...nek brulo, nek sufoko...do descendas
Mi per fereskalo al la fora fundo,
Fidiĝante pli je ĉiu novsekundo.
Aliaĵojn kvazaŭ tranĉe mi forgesas;
Absorbite, al la fundo pluprogresas,
Kaj atingas ĝin post longa desupriĝo,
Dum jam estas mia timo forvestiĝo.
La medion mi elportas plej facile,
Kaj klopodas por min helpi nun utile.
Fronte al la flamoj, kaj tra aperturo,
Mi alvenas aliflanke de la muro,
Supre de vastega groto lumineska,
Kies parieto ŝajnas magmo inkandeska,
Kiel la interno de forĝeja forno,
Kaj ĉe kies centro, sen bezon' de lorno,
Videbliĝas, jen ampleksa kiel urbo,
Pavimego! kiun "loĝas"...ŝajnkukurbo!
Vitra globo kurbe reliefiĝanta
Ekster la ses facoj de l'pavim' giganta.
Kaj en tiu globo videbliĝas plue
Oktaedro-piramidoj kvazaŭ glue
Alfiksitaj per la bazoj - jen ampleksa
Kiel templo, kiu igas min perpleksa;
Ĉar ĝi "kuŝas" centre de la globo,
Ŝvebe, sen subten' , en ruĝa-nigra robo,
Kaj de tiu "Templo" min la Voĉ' alvokas.
Tuj sen zorgi ĉu la loko tre barokas,

Mi descendas per alia fereskalo,
Kaj alproksimiĝas al la glob-bokalo.
Ŝajninvitaj aperturo kaj tunelo
Kondukantaj al la centro de l'...tonelo
Tuj sin formas en l'interno, dum pli forte,
Akompane kaj ĉirkaŭe, kvazaŭ korte
Kaj...postule, kun jam finvenkinta tono,
Voĉo sin amplifas, klara kariljono,
Dum efluvoj magnetecaj, kvazaŭ manoj,
Min altiras al voluptaj amhosanoj.
Sed mi nun rezistas: jenis rememoro;
Remanenco el la fundo de la koro;
Nebulozo bildiĝanta en mallumo
Pli rapide ol plej eta palpebrumo.
Antaŭ mi sin montras en plenefektivo
Tuta historio de l'homara vivo:
Ruĝa makulego sur la Tersurfaco;
Permanenta detruado far malpaco;
Fajra lago de pasioj kaj de krimoj,
De Kainaj ĉiestempaj Hiroŝimoj
De l'hombesto en konstanta fierupto,
Pro orgojlo, akaparo kaj volupto.
Kaj ĉe la komenco ĉies krimorgio
Reokazis tia nuptceremonio,
Mem premiso nepra de konstanta evoluo,
Malfermita pord' al freŝa sangelfluo...
Mi rapide retroiras kaj eskapas
Al l'influoj sorĉaj, dum la Voĉo gapas:
" - Kial vi hezitas? Venu, estas Tempo!
Ni de noveraro estas la printempo.
Jam la horo pasis...kial tiom longe
Vi min atendigis? Jen denove gonge
Batas mia koro pro alveno via;
Al kuniĝo nova estas mi envia;
Venu! Venu! baldaŭ estos tro malfrue,
La Naturo nin forpelos evakue;
Tero sin malfermos post momento,
Kaj pereos ni en kvazaŭ laftorento.
Venu! ĉar vi estas mia promesito:
Kial vi rezistas al la aminvito?
Venu! venu! ne daŭrigu la angoron
De la koro, kiu amas vian koron" .
Litanie la alvoko sin malvolvas,
Dum mi firme en rifuzo min absolvas,

Forstarante de tentakla la miraĝo,
Kiu vane elmoviĝas sen domaĝo.
" - Grandan emon mi mem sentas al pariĝo;
Sed klarvida tro mi estas kun vertiĝo.
Mi ne volas plue esti, kun fihonto,
De torenta krimorgio mem la fonto.
- Kial zorgi aliulajn la aferojn?
Ĉiu havas proprajn zorgojn kaj esperojn.
Lasu Dion juĝi pri ĉiesa sorto;
Venu, antaŭ ol forportos nin la morto!
- Tro konscia mi fariĝis ja en Vero!
Kiel trovi nun feliĉon sur la Tero?
Ĉiu plezurĝuo havas cindroguston;
En nenia loko eblas trovi juston.
Nura maskerado estas la homvivo,
Sen espero de alia perspektivo.
Kio estis, iam estos neŝanĝeble;
Antaŭ la "Principo" staras hom' tro feble.
Ĝi kreito estas, kun kreanta povo,
Sed transcendos ĉiam ĝin l'Eterna Movo.
Dion mi ne spitas: estas Li la Ordo;
Sed Li membalaŭ antaŭ sia pordo...
Se "Principo" povas teni balailon!
Mem Li kreis min libera , kiel filon;
Ĉu nur por agnoski Lian tutpotencon?
Glori kaj adori Lian Providencon?
Tia liberspeco estas servuteco;
Do servute mi obeas Lin kun deco,
Sed ne memkonsente. Kaj se memlibere
Mi elekti rajtas, mi rifuzas pere
Iĝi respondeca de estontaj krimoj
De tutmondaj ĉiuspecaj la oprimoj.
Mi rifuzas liberspecon nur ĝangalan,
Leĝiganta mortigadon ĝeneralan.
Tio estas nur besteca konceptado;
Homo estas de la homo kamarado,
Kaj sen interhelpo estas la libero
Nura anarkio: putra prolifero.
- Venu do! nenion ŝanĝos vi pri l'sorto.
Nura ŝlimo estas ni en Terretorto.
Ni almenaŭ ekprofitu nian parton;
La Homaro ne bezonas vian varton;
Sed se tardas vi tro, ni forperdos ĉion,
Kaj ni spertos porĉiaman disocion.

Venu! Salomono prave mem jam diris
Pri l'feliĉo, kiun ĉiam vi sopiris:
Ĝi konsistas por la viro el amoro
Kun virino, kiun amas lia koro.
Ĉu vi saĝas pli ol Salomono? Venu!
Kaj porcion da feliĉo vian prenu!
- Salomono ankaù diris, ke pri ĉio
En ĉielo repostulos poste Dio.
Ni do devas finelekti mem, sen pero,
Kaj decidi nian vojon sur la Tero.
Nur trans mortkurteno montras sin pravaj
Aù malpravaj ĉiuj agoj, eĉ ne gravaj,
Kaj sin determinas plua vivekzisto
Laù kapabloj akiritaj pro persisto.
Sekve estas homfeliĉo konsekvenco
Pacostata en la propra konscienco.
Estas homo mi, en korpo homara,
Ĉies homoj samegale solidara;
El mi morgaù fontos nova kolektivo;
En mi sin preparas l'homa perspektivo;
Nodo inter la estinto kaj l'estonto
De suferoj pluaj mi ne estos fonto.
Kiel mi feliĉus, se mi scius tion?
Se mi jam perfidus l'homan familion?
Ĉu frateco eblas sen kamaradeco?
Ekster ĉia tuthomara dependspeco?
Egoiste kaj aparte, sen tamtamo?
Nur per Vero kaj Justeco eblas Amo,
Kaj tutmonda "ĝenerala" homsocio,
Ekster hipokrita monhierarkio.
Kiu diris al la homo: "Vian fraton
Vi sklavigu!" Kiu donis la mandaton?
Kiu diris: "Vi jen estas superuloj,
Al aliaj kaŝu Veron sen skrupuloj;
Ilin paŝtu kaj mortigu mensogante;
Uzu vian intelekton plej pedante
Por de la "Principo" kaŝi la regulojn,
Kaj per falsaj dogmoj trompi sincerulojn?
Kiu sin arogis "gigantecan" rajton
Ekspluati siajn fratojn por la kajton
De l'orgojlo homa alten memflugigi,
Kaj la turojn de "babeloj" pluprodigi?
Dio? Ne! nur nanaj homoj senkonsciaj
Misuzantaj la prasciojn tradiciajn

Nur propraprofite, kiuj per homleĝoj
Anstataŭas Diajn, kaj sin nomas reĝoj.
Babelturojn, kiuj spite fanfaronas
Al ĉielo, la popoloj ne bezonas;
Sed deziras homoj hejmon familian,
Kie eblas naski homan vivon plian,
Laborante ĉiutage kaj kreante
Progresive laŭ naturaj leĝoj, lante,
Vivĝuante, harmonie, plenkonscie,
Por normale evolui promocie,
Obeante socileĝojn sen misteroj,
Sen "kanonpafado" vana de gangsteroj.
Ĉu mi estos plukomplico ties homoj?
Ĉu mi helpos al tutmondaj novpogromoj?
Ĉu la "Drakon" prafalintan mi kompatos?
Ĉu al "Besto" sangavida mi rilatos?
Ĉu al ĝia "Bildo" devas mi adori,
Kaj "Profeton falsan" memencensi, glori?
Ĉu mi daŭrigos samajn la erarojn,
Plenkonscie kaj memvole, spite barojn?
Ne! la tempo pasis de l'ekstravaganco:
Nun necesas nova vera "Alianco"
De la homo kun eterna la Principo,
Ĉar ne plu kongruas la antikva "Ŝipo".
Viv' ne estas ja senĉesa konfliktado,
Sanga krimorgio kaj militparado;
Tago ne malamas al la nokto,
Viro al virino, sen emfaza dokto,
Kiel fiasertas praaj religioj,
Kiuj estas krimaj nur apologioj.
La ĉielo kaj la Tero estas tuto;
Ĉiu vero nur aparta absoluto;
Kolektivo kaj individuo nure
Du nedisigeblaj entoj estas pure,
Kaj ne estas homo aĉetebla varo.
Memlibero sendependa jen l'eraro!
Ĉu por apartulo, ĉu por kolektivo.
La popolo suverenu sen fiktivo,
Rekte en la urboj, sen deputitaro,
Sen hegemonio kaj sen akaparo.
- Vi frenezas, mia kara, sed ne gravas
Se momente pro korsento vi malpravas.
Nur per mono eblas "mastri" la homaron,
Kiu volas nur idolojn kaj ...Cezaron.

Ne plu revu... al mi venu plej rapide;
Al realo ni alcelu nun avide!
Tempo fuĝas: senutile ni pereos,
Kaj en Nenieco por-eterne veos.
Venu! vi ne rajtas memdecidi
Pri feliĉo mia: lasu vin insidi!
- Dio memdecidu! homo en homrondo
Mi nur estas, kaj pro Vero vagabondo;
Al ĝi ĉion mi oferis sen koncedo:
Familion, karieron...ĉar posedo
Do la Vero kaj Justeco estis Celo
Transcendanta ĉion, laù mi, sub ĉielo;
Por ĝi mi baraktis sola sur la Vojo;
Malesperis en mallumo kaj malĝojo...
Ĝi ĉi tien min kondukis lasta-teste...
Ĉu tutvivon mi rezignos senproteste?
Nek riĉecon, nek volupton, nek potencon
Mi alcelis, sed nur homan konsciencon,
Kaj preferas memkonscie spiti Dion
Ol renaski sangan homan tragedion."
Mi apenaù finas, ke ekmalfermiĝas
Grundo: ĉio englutiĝas; mi vertiĝas...
La"pavimo" , l'oktaedro kaj la globo
Malaperas, dum, kun daùra malaprobo,
Voĉo malkresĉendas: "Venu! Venu! venu!"
Sed mi zorgas, ke l'abismo ne forprenu
Min, ĉar l'inkandeska magmo parieta
Diktavole ekdehiskas, kaj mi, preta,
Nun alsaltas en rokfendon, kie ŝirme,
Stare kaj opone mi min tenas firme,
Dum vortice, en finala kataklismo,
Ĉio foren malaperas tra l'abismo ,
Kiu refermiĝas...regas nun mallumo
Kaj silento en kaverna la "forumo"...
Kio sekvos? Mi ne scias! mi decidis
Plenkonscie: ĉu konscio min perfidis?
El rokfendo, palpe, grunden mi descendas:
Kia nova aventuro min atendas?
Ĉu mi mortos? Mi videble tro aùdacis;
Nu, eĉ kun la morto fine mi malpacis!
Kial mi rifuzis la venkintan kronon
Merititan? Ne obeis Voĉadmonon?
Kion povis mi esperi, krom la morto
Kaj fiaska finatingo al ...aborto?

Rajtas mi fieri: fuŝis mi totale
Mian vivon...ĉampione!.. grandaskale!..
Vivu la Heroo! la vilaĝa idioto -
Memstaranto! findecidis plu la loto!
Mem, trofidemulo, taksu vian taskon!
De mempretendemo metu for la maskon!
Via postulemo estis tro ekscesa...
Sinregado urĝe montras sin necesa:
Ho, silentu...mi! ĉu decas jam lamenti,
Kaj sarkasme pri l'paseo tiel penti?
Nova sperto komenciĝas: fidu Dion!
Mi pluvivas, do pluhavas esperplion!
Senpasie, sen riproĉa plua vorto
Mi atendas la dekreton de la sorto.
Mi elektis, mi ne mortis, konsekvence
IO pluokazos, kion pacience
Mi elportos, spitos aŭ plezure ĝuos,
Dum tagnokte kaj eterne Tempo fluos.
Sentimentoj kaj pasioj nur futile
Ĉiuskeĉe rolas, kvankam tre utile.
Efemere ili estas, de l'vivhoroj
Gajaj aŭ amaraj, la ornamaj floroj;
En la homa koro ili brilu astre,
Sed la homajn devojn ne memregu mastre!
Mi atendu...ĉar maleblas ion fari;
Animstreĉon nur mi povas al mi ŝpari.
Mi sterniĝas sur la nevidebla grundo,
Kaj en tomban dormon falas post sekundo.
Kiom daŭris tre agrabla la ripozo?
Mi ne scias...sed vekiĝas sen nervozo.
Kaj jen la okazo: lumo en mallumo!
Pli maldensa nur mallumo, kvazaŭ fumo,
Kiu iom-post-iome koncentriĝas
Ĉe l'grotcentro kaj laŭgrade prilumiĝas.
Ĝi similas homstatuon marmorecan;
Nun alprenas virinformon diinspecan,
Blanke bela, tute nuda...nereala,
Kun hararo neĝa, longa kaj ...vuala.
Gape mi admiras, dum la kor' petolas;
Sed...moviĝas la statuo...kaj parolas!
"Ŝi" min diras: "Venu! venu min! karulo!
Ne rezistu plue al la ampostulo!
Vi ne timu! de vi estas mi konscio:
Min vi liberigis el la materio;

De "elekto" via jen la konsekvenco!
Kaj de firma fido justa rekompenco.
Mortkurtenon vi transpasis dum la dormo,
Kvankam vi plustaras en vivanta formo;
Sed spirito vi jam estis de l'komenco,
Pro sincero, obstinemo, pacienco...
Kiel estus elportinta vi la teston
De la fajro en la puto? Vian veston
Vi rigardu: ĝin la fajro tute rostis,
Kaj memoru pri la flamoj, kiuj...frostis!
Ĉar, mem "fajro", ilin vi nur male sentis;
Varmodiferencon simple vi atentis."
Mi rigardas min, mi estas...tute nuda!
Karbonigra kaj ...ekhontas, ĉar, malpruda,
Elmontriĝas, kvazaŭ fera stango rigla,
De..."admiro" mia nun la signo vigla.
" - Kial honti? ŝi min diras, ĉu mi hontas?
Mi agrable al ..."omaĝo" via frontas!
Sed vi ne forgesu la rezolucion
Ne reokazigi sangan tragedion.
Min vi liberigis, vin mi liberigos;
Ĉis finkonsciiĝo vin mi pluinstigos.
Korpo min malhelpis plene vin instrui;
Miskomprene riskas ĉion vi detrui.
Kiel juste vi decidus sen totala
Sperto, sen koncepto priuniversala?
Pro obstino vi meritis novan konon;
Ni ankoraŭ plipoluru vian "ŝtonon". "

.....................................

(Ĉi tie mi verkis "M E M")

En Pantin la 30an/10/1972.

B.G.D

o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o

# Jen la Dio! (dua parto)

o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o

Nun necesas revizii de l'komenco,
Por kompreni pri la Dia Providenco.
Ĉio same estas, kreskas, amas, mortas.
Jen de ĉio l'aĝoj, kiujn mem elportas
La Vivprincipo, Di' universala,
Efikanta en la kadro kosmoskala,
Kaj en Sunsistemo, Tero kaj Homaro,
Baz' de analogio kaj komparo,
Memhelpilo por eliri el nescio,
Kaj atingi al la vera homkonscio.
Ĉar se "Leĝo" regas ĉion en Naturo,
La scienco ĉesas esti aventuro;
Ĝi fariĝas nure mensa projekcio
De l'Principo kaj...ideokonfekcio.
Liberiĝas mem la homoj de vivtimoj;
Ĉesas esti de "sorĉistoj" la viktimoj.
Per konato sin rivelas nekonato,
Kaj l'atomo mikroskala sunformato;
La paseo nin klarigas pri l'estonto,
Kaj l'estanto, inter ili nura ponto.
Ni ŝablone nun do uzu plej praktike
La "konaton" homo, simple kaj aplike.
Homo tera analogas ĉielhomon:
Sunsistemo; ni obeu l'aksiomon!
Al Plutono analogas la homaro,
Nebulozo dekomenca, sen eraro,
Kaj unua hipostazo de l'Principo,
Kiu de "Patro"-agado estas tipo.
El ĝi dise "viro" kaj "virino" fontas,
Kaj responde al Urano kaj Neptuno frontas.
Ili rekuniĝas, konsistigas "paron",
Duan hipostazon, "Filan" avataron,
Pra-Kaina kaj Habela tragedio,
Diofila morto en la materio,
Stupro de l'virina sekso per la vira,
Sangofero de Habelo...ĉu martira?
Jen de ĉiuj estoj dekomenca "urno",
Kaj nomita prave tial...praSaturno.
Tiel viro kaj virino, sen mistero,

Analoge al Saturno, Jupitero,
Per natura konsekvenca determino,
Plu fariĝas tiam edzo kaj edzino;
Kaj per infanaro - tria kaj spirita
Hipostazo kaj unua "Marso" spita -
Iĝas "Patro" kaj "Patrino" ,sen rebuso,
Analoge al NovMarso kaj Venuso.
Tiel mem sin formas "ĉelo" familia,
Fina hipostazo, ankaŭ "Tero" nia,
Kiu, per laboro de la "filo Suno",
Per la mastrumado de "l'filino Luno",
Kaj interrilatigado de Merkuro,
Kreskas kaj funkcias en la "Babel-turo"
De l'homaro en konstanta konfuziĝo,
Per vortica morto-naska vivvertiĝo,
De plej atompartikleca dimensio,
Ĝis al onda nulfrekvenca ekspansio.
Jen tutsimpla la "ŝablono" ĉies konoj;
La vehiklo por esplori tra l'eonoj;
Tiu, kiu diras: "Vivu dum vi vivas!
Ĉar vi morgaŭ mortos. Kial vi aktivas
Kaj starigas altajn turojn al ĉielo,
Senprofite vin dediĉas al ficelo?
Baldaŭ falos viaj turoj, atestantoj
De gangsteraj viaj agoj, ho, gigantoj!
Kiuj ne komprenas, ke necesas morti,
Kiam estas tempo. Provas vi perforti
La leĝaron Dian; eternigi vivon;
Al l'estonto memorigi homaktivon...
Mem aldoni ulnon al staturo via
Vi ne povas: kial esti tro envia?
Homoskale nur vi staras en homrondo;
Harmonie provu vivi en la Mondo!
Vi profitu lastajn jarojn subĉielajn,
Ĉar vi morgaŭ spertos jarojn subtunelajn.
Ĉar, post "bapto" per "diluvo" hieraŭa,
Venos "bapto" per la "fajro" tuj morgaŭa.
Vi do lernu de "sep grasaj la bovinoj",
Por pretiĝi al "malgrasaj" la abstinoj.
Tiel homoj en konscion stoku "grenon"
Por sin helpi transpasinte mortkurtenon.
Transe turoj nure vanas, kaj hom' lernas,
Ke mi sole nur potencas kaj eternas.
Humiliĝu do vi antaŭ la Principo:

Estas ĝi la bazo de homemancipo."
Jen la diroj de "Ŝablono" la eterna,
Kaj de homo la "Gvidilo" memlanterna.
Ĝin apliku al la korpo samutile,
Kaj al kolektivo; ĉiam malsibile
Ĝi al vi klarigos pri interrilatoj
Ekzistantaj en la Kosmo, sen traktatoj,
Kaj respondos al ĉiamaj la demandoj
Ne solvitaj de sciencaj memorandoj.
Ĉar Scienco, nur zorganta materion,
Mem ignoras "l'Oran Dian Kompendion";
Pri ĝi volas eĉ ne aùdi, eĉ ne vidi;
Do ne rajtas pri l'homsorto memdecidi.
Povas ĝi nur finkonfirmi, post hezito,
La eltrovojn pionirajn de l'spirito.
Kiel la sorĉistlernanto senkonscia
Ĝi elkatenigas en la kamp' socia
Blindajn fortojn pro frivolaj emoj;
Tiel sin mem naskas multaj novproblemoj,
Kiuj, nesolvitaj, kvazaù tajdo mara,
L'homon pelas al destino plej amara,
Al apoteoza la finkonsekvenco (°)
De l'sciencaj homoj la senkonscienco,
Kiuj, sin opiniante superuloj,
Provas mastri siajn "fratojn", sen skrupuloj,
Per trompado kaj...inica "selektado".
Ili homan vivon igas maskerado.
Per fireligioj, sektoj kaj partioj,
Monhierarkio kaj revolucioj,
Mondmilitoj kaj raciaj genocidoj,
Nepre iĝas ĉiuj horoj mortinsidoj.
Jam de longe mi pri tio vin instruis,
Kaj intence ĝin denove mi revuis.
Nun ni uzu plej praktike nian "dion"
Por konstrui tutan kosman kompendion".
En mallumo, dum ŝi estis parolanta,
Ŝi desegnis per lumfingro eleganta,
Kaj la strekoj, kvazaù sur tabulo nigra,
Lumineskis kun rebrilo helverdigra.
Nun tri skemoj "pendas" en kompakta nokto,
Kiujn ŝi komentas kun pedanta dokto.
Kvar lozanĝoj konsistigas ĉiun skemon,
Kaj pritraktas ĉiu skemo unu temon.
La unua pri la sunsistemo, la alia

(°) Bonvolu legi la reĝustigon fine de p.42

Pri la homo, kaj pri korpo ja la tria.
" - Ni jam scias, diras ŝi, ke per ovolo
Ĉio komenciĝas: Edenosimbolo,
Nura ovo en statika neùtra stato.
Per konvenaj radiado kaj klimato
Tiu ovo eklumiĝas, ekmoviĝas,
Kaj rapide diseriĝe multobliĝas,
Ĝis kompleta kaj normala ekspansio,
Kiu estas ĝia propra dimensio.
Kia estos tiu de la kosma ovo?
Nu, tri per kvar: dekdu, sen aldonprovo.
Estas tri: spiritaj tempaj la principoj;
Estas kvar: naturaj l'elementoj-tipoj.
Dekdu bazunuoj estos diametro:
Dekdu centimetroj jen po centimetro.
Pro konveno mi nun uzas mezan skalon."
Kaj komencis ŝi desegni la "Pokalon";
Faris cirklon per fingropint' diamanta.
" - Jen l'ovolo kosma ĉion entenanta;
Materia-radiada agregato
Ekzistanta en malluma nigra stato.
Ĝi subite, pro nuklea energio,
Ekfariĝas tutĉiela lumorgio.
La tri elementoj, ĝin konsistigantaj,
Refariĝas praunuoj samgigantaj:
La Urano-viro, la Neptun-virino,
Dum la radiado fuĝas al novsino,
Al polvenmateriiĝo: sunsistemoj,
De atomoj kosmoskalaj la emblemoj,
Memevoluantaj laù procezo sama,
De plenekspansio al l'ovol' iama."
Dume strekon faris ŝi horizontalan
Tra la cirklo; kreis cirklon nun dualan,
Duonparte nigra, duonparte luma,
Pro rapida mansvingado koloruma.
Kaj ĉe ambaù diametraj la ekstremoj
Desegnite jam sin montras novaj skemoj;
Ĉiuflanke pendas unu sub alia
Kvar lozanĝoj, dum ĉe centro skemo plia
Sin konstruas samatempe kaj aùtomate,
Kaj mi vidas, ke sin montras aplikate,
Signoj de Urano, Neptun' kaj Plutono,
Kiuj sin rivelas vera "triŝablono",
Oferita de pratempoj al sagaco

De la homoj: "Krono" mem de homaùdaco.
" - Jen ŝi diras la"Eterna Prototipo",
La unua "Patra" fazo de l'Principo.
La supera nigra parto, Plutonsigno,
Reprezentas statikstaton dum rezigno;
Per la luma kaj malsupra, ekspansio
Elmontriĝas pro fisia disocio,
Kaj sin liberigas "viraj" la protonoj,
La "virin"-neùtronoj kaj la "par"-elektronoj.
Ĉe la dekstra flanko jen la vir-Urano,
La videbla kosmo, stela lumfontano,
Kaj simbolo de internaj la kvalitoj
De la "Patro" per ĉielaj ĉiuj splitoj;
Mem "ĥaoso" lum-malluma sen surfaco;
Kosma nubo en la Tempo kaj la Spaco;
Energia-materia agregato;
Bazo de l'tutkosma aparato,
Fonto de l'kvar fundamentaj elementoj.
Jen l'unua de la paraj kosmo-entoj.
Ĉe maldekstro jen la dua: la virino.
Kosmo nevidebla, Neptun-mar' sen fino.
Ĝi konsistas el atomaj la partikloj
Kaj ondsferoj el diversaj detruciklo j,
Ĝi universala materio estas;
Nebulozoj, kiuj mem sin manifestas
En lontanaj galaksioj...universoj,
De la materio bildaj la inversoj,
Kosmoskala "bakteria" prolifero,
Plidensiĝoj de senlima la etero,
Konsistantaj el sennombraj miriadoj
Da sporadaj sunsistemoj en paradoj;
Ĉiu kun planedoj, inkluzive Tero,
Kun la kontinentoj, maroj, atmosfero.
Dume, ĉio rekuniĝas ĉe la mezo;
Reokazas materia la sintezo,
Pro la fluo radiada de l'fisio
Nun aganta energie per fuzio.
Komenciĝas nova regno materia
Ĉe atoma skalo: sunsistemo nia,
Nur "fotono" kosmoskala refalinta
De la "punkto nulo" tra la labirinta
Ondsferaro materia; ĉiusfere
"Repruntita" elektronon persevere,
Ĝis al nepra kolizio kun neùtrono,

Kaj fisio en la kosma "ciklotrono";
Nana kosmo kaj...Plutono, mem fidela
Rebriliĝo de la kosmo tutĉiela,
Kiu evoluas laŭ aparta normo,
Ampleksiĝas ĝis konvena formo,
Kaj afinacia iĝas aparato
Por la materio ek al spiritstato,
Per pluatomiĝo tra la kosmo-homo;
Tria evoluetapo antaŭ zomo
Al la Nenieco, al la morta Sino,
Al fotona stato, ĉiam kaj sen fino,
De ovolo al tutkosma ekspansio,
De kristalo al plej klera homkonscio.
Sed respondas ĉiun tempociklon spaco;
Al lozanĝo do respondas rondsurfaco;
Sed ni ne forgesu: temas ja pri sferoj,
Kaj pri kuboj, mem simboloj sen misteroj
De l'kvar tempaj aĝoj de la evoluo
En senfina spacocikla kontinuo;
"Digestado" de la Spaco per la Tempo,
Tra l'sezonoj, de printempo al printempo.
........................................

Tie strikis mia Muzo: "Nur duona estis ja la deka ŝtono!" ŝi nur diris sen kroma klarigo. Kaj iu "migranto",atinginta al tiu etapo, min komprenos.

Mi nur deziras al tiu, ke malpli ol mi li vane spitu , doloriĝu kaj suferu...kaj ke li venke eskapu la subitan mortigan danĝeron tie kuŝantan.

Do,eskapinte, nun proze mi daŭrigas la rakonton.

Dume ŝi daŭris desegni kaj komenti; sed tio, kion ŝi diris, ankoraŭ ne povas esti rivelita ĝis la tempoplenumiĝo. Mi ĉi tie memvole silentigas min: jam tro klare signis mi la Vojon. Necesas, ke la kolektivo finspertu kaj komprenu, ke individuo estas io alia ol nura marioneto manipulebla per orgojlemo, monakiremo, seksaj kaj sentimentaj deziroj; ke de ĝi dependas la kolektiva pluevoluo; ke same kiel kristanismo ne ekekzistis sen Kristo kaj Virga Maria, tiel nova erao ne povas ekekzisti sen Vero kaj "fakta" Justeco. Simbolaj artifikaĵoj tie vanas. Ne nur la individuo plenumu sian rolon, sed ankaŭ la kolektivo.

Sed alian fenomenon mi baldaŭ rimarkis: de kiam ŝi komencis desegni, ŝia aspekto iom post iom pli mallumiĝis je ĉiu streko kaj litero; dum en la kaverno la mallumo pli

kaj pli heliĝis, ĝis, ĉe la fino, ŝi fariĝis tute nigra , dum samtempe mi reakiris mian antaŭan blankulan haŭtkoloron. Fininte desegni, ŝi turniĝis al mi kaj diris: " - Nu, jen la respondo al ĉiuj viaj ĝisnunaj demandoj, de kiam , nazmuka, nudpieda kaj ĉifone vestita stratknabo, vi demandis vin pri Vero. Nun, rilate la evolucion: kio estas homo, de kie ĝi venas, kien ĝi iras, vi scias ĉion. Al vi mi donis mian tutan lumon; pro tio mi fariĝis nigra kaj vi mem reakiris vian antaŭan haŭtkoloron. Sed kvankam nigra, bela mi restas, ĉu? Ĝissate kontemplu min, ĉar baldaŭ ni disiĝos kaj dum longa tempo vi ne plu min vidos ; sed ne timu: mi ĉiam estos apud vi. Tio estas la nepra konsekvenco de via decido: rifuzinte pluan evoluon kun la materia Eva, vi komencis novan kun la spirita. Tiel agante, vi malfermis novan pordon, kreis novan "vivprocezon", kaj necesas, ke ĝi nun glate malvolviĝu.

Ne riproĉu vin: tio nepre necesis por la evolucia plenumiĝo; ne Davido konstruis la "Templon", sed lia filo Salomono; Davido nur klopodis pri la necesaj materialoj .

La "tria Tago" ankoraŭ ne plene okazis: necesas, ke la nova "Babelo" (aŭ Siono °) konstruiĝu dum la "tempo de la nacioj"; poste venos la "nupta bankedo" dum mil jaroj.

Mi reiras al ĉielo kaj vi al Tero; vi nun scias pri la Vojo, la rimedoj kaj la tempoj; ĉu pri alia temo vi deziras plian klarigon?

- Jes! diris mi; pliprecizigojn pri bono kaj malbono mi dezirus ricevi.
- Mi al vi montras Dion, kaj vi ankoraŭ petas min pri bono kaj malbono?
- Jes ja kaj tute prave! scii pri Dio estas unu; scii pri bono kaj malbono estas du. Ĉu mi do agos malbone nur por sekvi la Dian Vojon? Ĝis nun vi direktis min; sed, poste, sola mi estos por decidi, kaj necesas, ke klare mi konsciu pri la sekvenda vojo; svaga intuicio ne sufiĉas; necesas konfirmita klara koncepto; kaj nur vi povas konfirmi al mi mian propran pravecon.
- Malmola kapo! ĝis kiam vi dubaĉos? Ne sen motivo vi atingis finon de la Vojo, rezistinte ĉiajn provojn vin detrui! Kial vi deziras manĝi frukton de l'antikve malpermesita arbo? Kredi, esperi, ami, jen la sufiĉa Leĝo. Provi kompreni estas la eraro; ĉu vi deziras, ke nova

°) aŭ Ciono.

sanga homtragedio reokazu?

- Mi nur deziras scii pri la kaŭzo kaj motivo de tiu tragedio; nur sciante mi eble estonte povos eviti ĝin; alegorio pri arbo , kies fruktoj estas bono kaj malbono , nenion precizan klarigas. Cetere, kion mi riskas?
- Vi riskas nur scii kaj malesperi. Nenion vi evitos , ĉar necesas , ke la vivprocezo ĝisfine plenumiĝu , kaj,pri la nepre traspertotaj travivaĵoj, estas prefere ne antaŭscii.
- Ĉu do mi fermos miajn okulojn por ne vidi kaj ŝtopos miajn orelojn por ne aŭdi ? Ĉu konsekvence mi memvole fariĝos servutulo de tiuj pseŭdaj "superuloj",kies supereco mem kuŝas en tia uzado de siaj vid- kaj aŭd-kapabloj? De tiuj,kiuj,kaŝinte la Veron en mitologiajn fabelojn, kies sencon ili rivelas nur al siaj inicaj komplicoj, intence, malhelpis kaj daŭre malhelpas la normalan malvolviĝon de l'Vivprincipo, kaj konscie perfidis kaj perfidas sian naturan instruan mision, por konservi la apanaĝon de unuenaskitaj "filoj", kaj la momentan superecon al ĝi kunligitan? De tiuj, kiuj tial intence kaj konstante erarigas , ribeligas kaj militigas la homojn, kaj estas mem kaŭzo de ĉiuj disiĝoj, krimoj kaj suferoj okazintaj kaj okazantaj en tutmondo? Ĉu bono estas subiĝado al l'Ora Bovido? Ĉu do Moseo malpravis mortigiginte ĝiajn adorantojn far la Levidoj? Ĉu ankaŭ Kristo malpravis forpelinte la monŝanĝistojn el la Templo, kaj dirinte, ke ne eblas samtempe servi Dion kaj Mamonon?

Antaŭ la totala freneziĝo de l'tutmonda sociordo mi ne komprenas, kion pli malbonan povus sperti la homaro, kaj, persone, funde de l'puto, kaj perdinte ĉion, inkluzive vin, mia animo, plue malesperi por mi ne eblas.

- Estu do farite tiel,kiel vi ĝin deziras! Estas nek kaŭzo, nek motivo al la homa tragedio, krom la homa malbonvolemo mem. Bono kaj malbono estas la du naturaj Diokomponantaĵoj. Malbono fontas el bono, kaj bono el malbono same kiel lumo fontas el mallumo, tago el nokto, tempo el spaco, energio el materio, amo el malamo, virino el viro, ...ktp,...kaj recipnoke.

Se Dio, Principo nekreita, estas perfekta Bono,malbono komenciĝas do kun Kreado, kun "falo" de la Dia Penso aŭ radiado en la materion; sekve, Dio, aŭ bono, estas kaŭzo kaj unua paŝo al malbono, aŭ Diablo, kaj Diablo,unua paŝo al Dio. Ambaŭ konsistigas du fazojn laŭvice nepre necesajn

de senĉesa kaj senlima evolucio en Sino de l'eterna "Patrino" nenieco, kies vualon neniu iam kapablis kaj kapablos levi, eĉ trans morto; ĉar morto estas transpaso de korpa al radiada stato, tiu radiado estas nepre limigita de matematikaj leĝoj en aparta ondosfero: fino de ekspansio konsistigas do komenciĝon de koncentriĝo, kaj nenieco restas nenieco eterne kaj senlime.

Dio, transcenda intelekta ento, kiel kutime instruas "internacio pri popolbrutigado", kiun konsistigas diversaj religioj kaj sektoj, ne ekzistas. Ekzistas nur Principo, aŭ Procezo, de materia evolucio, kies komenciĝo , fino kaj limo ĉiam eskapos homan scikapablon, kaj nur per analogio oni povas rilati kun ĝi, ĝin intuicii.

Sekve, bono estas kongrueco de homa agado kun la evoluciaj leĝoj, kaj malbono malkongrueco kun ili.

Tial celi kompreni kondukas al morto; kredi, esperi kaj ami kondukas al vivo. "Pekas kaj kulpas" la scianto, kiu spitas la regulojn; nescianto ne kulpas.

Tial religioj kaj sektoj brutigas la popolojn, ke ili ne "peku"; tial la scio estis kaŝita en fabelojn,legendojn, kutimojn kaj morojn. Ankaŭ tial: ĉar Tero estas "intestaro" de Sunsistema korpo,sekve, ties korpo estas homaro "intesta flaŭro", kies tasko estas transformi la materion, spiritigi ĝin, ke ĝi estiĝu asimilebla de l' intesta mukozo, transpasu en sangon, kaj vivigu tutan korpon. Sed se l'intesta flaŭro mem spiritiĝus kaj transpasus en sangon, "kiu" transformus la materion? Korpo sekve mortus. Intesta flaŭro nepre necesas, sed tia neceseco ne neprigas popoldispartigon laŭ kastoj aŭ klasoj pro monaj aŭ religiaj motivoj, nek ĉiuspecajn, ĉiestempajn kaj ĉieslokajn homajn oferbuĉadojn, memvolajn aŭ ne, oferitajn al la "Sun-Patrino", ke ŝi daŭre sendu teren sian lumon.

Ne Dio responsas pri tio, sed la homa egoismo mem,kiu malhelpas normalan konceptadon pri vere homa sociordo. Zorge meditu pri tio.

Ankaŭ zorge meditu pri tio, ke viro kaj individuo analogas al roko; ke virino kaj kolektivo analogas al akvo. Stari estas natura roka rolo; senĉese falflui de ĉielo al grundo, de monto-suproj al maro estas tiu de akvo.Roko limigas akvoekspansion; akvo transformas la rokon, kaj el ĝia detruo kreas novajn vivoformojn; sekve, kion faru kaj

okazigu virino aŭ kolektivo, pri tio responsas viro kaj individuo, kiuj lasas sin "insidi" kaj "faligi" de virino aŭ kolektivo. Ĉiu laŭnature rolu en vere homa sociordo. Cetere, homaj problemoj ne ekzistas: ekzistas nur homaro ne organizita, homara ĝangalo.

Estas "malbenito" kaj "savanto" (Prometeo sur sia roko kaj Kristo sur sia kruco)...ankaŭ"Atlaso", nur tiu, kiu ĉion elportinte, rezistinte, kompreninte, sintezinte kaj ...rifuzinte, fariĝas la "propeka kapro" oferenda;ĉar tiu portas en sia konscio sumon de ĉiuj pasintaj homaraj komprenprovoj (aŭ pekoj); kaj iĝas spermatozoo je homara skalo, tenta serpento de Geneza rakonto, kiu trapasinte la "fajran lagon" de l'utero patrina, posteniĝas antaŭ la Eden-ovolo, en kiu, dise kaj senkonscie, vegetas kerno Adamo kaj protoplasmo Eva.

Plie, kio veras dum statika stato, malveras dum dinamika. Ĉiuj nocioj laŭvice inversiĝas, same kiel transpasinte ekvatoran linion, Suda Kruco iĝas direktilo anstataŭ Norda Stelo. Tio montras, ke sur Tero, normala evolucio okazas laŭ tri ĉefaj Suninfluaj direktoj: laŭekvatora,alnorda, alsuda, simboligitaj de virŝafaj kornoj de Jupitero-Amono. Ekvatora linio mem, pro kliniĝo de tera akso kaj iom-post-ioma malegala malapero de polusaj glacioj, kombinita kun regulaj diseriĝoj kaj rekonsistiĝoj de Tera magneta zono, laŭvice oscilas de nordo al sudo kaj de sudo al nordo, kun ties memkompreneblaj konsekvencaĵoj.

Bone sciante pri tiu ekvatora balanciĝo, kaj dezirinte ĉu bremsi,ĉu akceli (kiu scias?) ĝin, por pruvi al si sian "diecan" ja tutpotencon, permesanta al ili laŭvole detrui la tro "evoluintan", do por ili tro danĝerigan, parton de l'homaro, la "prasaĝuloj" kaŝis tiun scion al la popolanoj, kaj tiel mem kreis la procezon kondukintan al atomerao, al tuttera poluciado, al "amaraj akvoj" de Biblio, kaj al jam projektita plano (°) pri rimorkado de polusaj "glacimontoj" per ŝipoj, por provizi la ĉirkaŭekvatorajn popolojn per pura akvo. Ĉu konkludo necesas?

----

(°)Laŭ la ĉiusemajna franca gazeto "L'Express" n°1103, sept.1972,paĝo 38,1a kolumno. Projekto de S-roj John Hult kaj Neil Ostrander el la Rand Corporation.Projekto oficiale financita.

Homoj neniel povas ĉu helpi, ĉu malhelpi la Principo-malvolviĝon; ili kapablas nur fari per pli malpli da bonvolemo,ke socia vivo iĝu pli malpli harmonia, sekve, ke pli malpli mildiĝu iliaj penoj kaj suferoj.

Ĉar tuta kreado estas "malbono", ĉio ajn aparte kreita signas ian gradon de ĝenerala malboneco, same kiel termometro-strekoj signas ian gradon de pli malpli alta malvarmeco. Paracelso prave diris: "Nenio estas veneno; ĉio estas veneno; nur gravas la kvanto (uzita)". Same nenio estas malbono; ĉio estas malbono; nur gravas homa bonvolemo. Ju pli bonvoleme, des pli harmonie,feliĉe kaj...bone.

Nun necesas disiĝi kaj pluen iri. Dum tempo, tempoj kaj tempoduono vi ne plu vidos min, ĝis venos la rekuniĝa tempo. Ĉu ion plu vi deziras scii?"

Premita de nigra melankolio mi nur nee kapsignis.Pri kio mi povus ankoraŭ peti klarigojn? Pri ĉio nun mi scis...almenaŭ mi tion opiniis; sed la sekvo al mi tuj pruvis, ke neniam estas fino, ke ĉiam estas io plulernenda.

" - Do, ŝi diris, refirmiĝu por alfronti novan vivon; ne plu decas ĉagreniĝi; vi bezonos vian tutan energion por reẑisti novajn drastajn testojn,por pluevolui, kaj finfine ne plu renaskiĝi...tiam necesos rezisti enuon de senfina ripozado, kiun vi mem iam ĉesigis per via deziro krei; tiel pruvinte, ke unuformeco ne estas elportebla, eĉ de vi, kaj ke senĉese paŝi al novaj vivoformoj estas esenco mem de homa vivo,laŭ Dia bildo.

Nun adiaŭe kisu min kaj forte min tenu en viaj brakoj, ĉar ni tuj estos forte skuitaj; sed ne timu se vi ne plu vidos min: mi tamen ĉiam estos apud vi,sed necesos, ke vi denove min liberigu por min retrovi."

Mi komprenoble ne ripetigis la inviton; ŝin mi brakumis kaj tuj volis ŝin kisi, sed ŝi diris: "Momenton, karulo!...tuj kiam ni startos." Kaj brakojn levinte,ŝi kriis: "Monto liberiĝu!" Tuj tondra grondado ekaŭdiĝis; kaverno-vandoj kaj grundo ŝanceliĝe ekmoviĝis; subite kun frakasiĝa bruo dispartiĝis la kvar piramidaj edroj; kastelo, monto kaj maro ne plu videbliĝis; kvazaŭ luma nebulo sur nin falis kaj ĉion invadis, dum forta voĉo aŭdiĝis: "Kiu estas kiel Dio?", kaj dum verda fulmo ek-

...gris.

"Nun kisu min, ŝi diris." Kaj mi kisis ŝin avideme,ĝueme, malespereme, en stranga mensostato, kie reliefiĝis nur mia firma volo eltiri la tutan eblan ĝuon el tiu unika momento, kaj forgesi ĉion eksteran,ĝis...ĝis mi konstatis,ke mi brakumis kaj kisis nenion: ŝi estis malaperinta sen ke mi eĉ konsciis pri tio, kaj mi restis sola en tiu kvazaŭ lakteca moviĝanta maso, opaka kaj frostiga, ĉiusencen skuita kaj turnita de kvazaŭ fortaj ventoskualoj,kontraŭ kiuj estis ne eble spiti kaj rezisti.

Fojon plian mi sentis min mistifikita,perfidita pro troa naivemo; ĉu do neniam tio ĉesiĝos? Ĉu do ĉiam pro sincera konfidemo mi idiotiĝos? Kaj malespereme mi kriis, al tuta kreado,eĉ...al ŝi. Per brakoj kaj gamboj ĉien disĵetitaj mi baraktis por eliri el tiu netravidebla blanka maso,kiu penetris kaj frostigis min; sed nenio helpis,kaj, baldaŭ tute elĉerpita, rezigninta, mi ĉesis lukti, forlasante min al la sorto, kaj rifuĝis en profundan oportunan dormon.

.......................................................

En kliniko,post nefacila akuŝado, ĵusa akuŝintino ripozis,pala, en lito, kiam juna flegistino eniris, portante ĵusnaskitan bebon zorge vinditan:

" - Jen la aĉulo! ŝi diris ŝercante; bela knabo! pri tio ne estas ja dubo! Kaj oni ne bezonis instigi lin bleki: kia voĉo!" kaj ŝi prezentis la bebon al la patrino; sed, fortenante la vizaĝon tiu diris:

" - Formetu tion de mi! socia helpservo pri li zorgu!" Iom surprizita kaj sen insisti (ne la unuan fojon ŝi aŭdis pri similaj okazaĵoj) la jam kliniĝinta flegistino restariĝis kaj kompatis:

" - Mi komprenas, la malfacila akuŝado iom perturbis vin...

- Nur mise vi komprenas; la afero pli simplas. Mi estas prostituino kaj jam sufiĉe malfacile baraktas en la ĉiutaga "merdujo" por ankoraŭ pluembarasi min per tia blekema... ŝtrumfo (°). Li fuĝigus la klientojn. Pli profita estos al li zorgado de socia helpservo; cetere mi ne havus tempon zorgi pri li.

- Sed vi almenaŭ donu al li nomon...

- Mem zorgu la aferon; pri ĝi mi volas eĉ ne aŭdi.

- Ĉu la patro...

- La patro!.. necesus unue scii, kiu estas la patro...vi

-----

(°) ŝtrumfo: ano de mita popolo el la desegnitaj bendoj.

vere tro postulas!

- Nu, proponis la flegistino post momento, vi ĵus diris, ke vi ne volas embarasi vin per tiu blekema ŝtrumfo, do, Blekema Ŝtrumfo estos lia nomo...konsentite?
- Tamen, ne! Oni ne rajtas handikapi lin la tutan vivon, se li vivos, per tia aĉa antaŭnomo.
- Ho! ĉu la patrineca sento vekiĝus?
- Kompreneble! Ni,virinoj, tiaj estas: ĝismedole patrinecaj.
- Do, pri l'antaŭnomo?
- Li estas masklo...nomu lin Julo; tio trudiĝas, ĉu ?(°)
- Bone! Julo Ŝtrumfo estos lia nomo.
- Konsentite!...nun mi plenumis mian sanktan patrinecan devon: for la piloleskapinton!Sufiĉe mi vidis lin.

Tiel fervoreme akceptita mi renaskiĝis en alia sfero; ĉiam sola, klarkonscia kaj forte vokanta,kiel decas al sincera koro sin sentanta ĉies homoj kamarado. Nur tro raciema kaj pli vivĝuema ol patrinecema estis la patrino. Sed pri tiu temo mi ne insistos: en abismon nur eblas fali.

.......................................................

Estas bela vetero; vera printempa vetero komence de senneĝa vintro. En lazura ĉielo Suno brilas,kaj,trompitaj de nenormala temperaturo milda,en razenaj bedoj lekantetoj kaj leontodoj ekfloriĝas. Ĉie , per ĉiu folio, ĉiu herbero,ĉiu florpetalo Naturo instigas al harmonia vivfeliĉo; en ĉiuj tutmondaj urboj homoj vokas al unio kaj al paco; sed la popoloj,misgvidataj kaj mastrataj de fiŝtatoj-reĝoj nur celantaj proprajn gloron kaj potencon kaj influataj de frenezaj religioj-dioj avidemaj je sangaj homoferoj, ne aŭdas ilin, kaj arde (kaj hierarkie) daŭrigas sin interbuĉadi, kiel hundoj ĉirkaŭ osto, kiel rugbeoteamoj ĉirkaŭ "ovalforma" pilkego.

Kaj Voĉo nun familiara min sufloras:

" - Ne plu zorgadu pri ili,karulo; ili daŭre staras en mensostato de ĝangala besteco,en la homara "Marsa"epoko: ili vin ne komprenus,kaj senutile vi mortigigus vin.

Ĝis ili,same kiel vi, ne atingos fundon de l'puto;ĝis ili ne ĉesos fali en erarojn,malesperojn kaj militojn,ili ne recelos al Vero, al Espero, al Paco...

De Sumero,antaŭ dek mil jaroj,sur siaj nigraj ŝipoj ,

---

(°)en franca populara lingvo, Julo = masklo,fortulo,ktp.

ili celis al la granda urbo kaj ĝin sieĝis, avidaj je masakradoj,rabakirotaĵoj kaj mortigistan famon: Saùlo mortigis mil; Davido dek mil!...Ne la popolfeliĉo interesas ilin, sed gloro de Agamemnono kaj Aĥilo.

La Troja batalo ankoraù ne finiĝis; ni daùre travivas la "Hom-eraan" epopeon...la Ulisa "ĉevalo" staras en la urbo...plumemoru: "Dum naù tagoj ili amasigis ŝtipojn; la dekan ili ekflamigis la ŝtiparon..."

Vi cetere pri la sorto ne plu zorgu: pri vi jam "ŝtato" ekzorgas. Vi komprenu...vi troigas!

Vi ne estas fitrompisto, nek ŝtelisto, nek murdisto; vi eĉ ne dizertis dum milito, kaj pro tio ne fariĝis respublikprezidento; vi nur estas sincerulo, diligenta honestulo, konscienca laboristo, skrupula leĝobeanto, fidela kunhelpanto de aliaj; vi regule pagas viajn impostojn, do ne iĝos vi ministro; vi mem zorgas vian sanon sen helpo de kuracistoj; vi mem solvas tre malgravajn kaj tre rarajn vivproblemojn kun aliaj kunvivantoj; vi bezonas nek idolojn,nek diojn, nek religiojn... vi ne estas rentabilitata!... via nura ĉeestado estas vera provokado kaj ekzemplo plej nociva, pruvo pri senutileco de juĝistoj, policistoj, pseùdaj kuracistoj kaj aliaj advokatoj, politikistoj,pastroj,parti- kaj sindikat-gvidantoj...kaj nun vi naive aùdacas plualdoni, ke libereco sen interhelpo ne estas Vero; ke egaleco sen solidareco ne estas Amo; ke frateco sen universala kamaradeco,t.e: sen konscio pri tutmonda vivkonekseco, ne estas Justeco!!!

Tion socio ne povas plutoleri. Bordeloj estas tolereblaj; ankaù rentabilitatigo de laboro, t.e. prostituado de gelaboristoj, kaj ĝenerala rabado al civitanoj per pli malpli laùleĝaj rimedoj: en ŝtelista medio necesas ja ŝteli; konscienco, profesia aù alia, tie malpravas; memstara honestulo tia, kia vi, nur perturbas normalan sociordan funkciadon; por moderna prostituanto-ŝtato nur gravas kaj pravas "gegajnemuloj"; tiuj, kiuj plenigas la ŝtatkason , kiaj ajn estas la procedoj uzitaj, se la leĝ-fasado estas respektata; sed honestuloj-perturbantojn tiajn, kia vi,ĝi nepre devas elimini.

Vian tutan vivon vi konfidis la nacion; fidele kaj diligente servis ĝin sub ŝildo de pseùdaj libereco, egaleco kaj frateco, kaj fidante viajn civitanajn rajtojn: kia eraro estis la via! Vidu la rezulton: senlaboreco, izoleco kaj libero morti sola kaj senhelpa.

Duala estas la socio: oficiala kaj okulta,kaj la okulta povo regas la oficialan. Nacieco estas nur preteksto kaj ŝtato fasado. Gravas nur monpotencoj agantaj per oficialaj kaj okultaj sektoj. Vi ne volis kliniĝi antaŭ ili kaj ŝafumi kiel aliaj, do restis al vi "libere" elekti inter trampa vivo, enkarceriĝo, memmortigo kaj...frenezulejo. Vi rezistis la tri unuajn, sekve restas al vi la kvara: vi rajtas ja vivi!.. kaj tiun fojon ne plu pretendu, ke sen motivo oni malamis vin!

Cetere, krucumado ne plu decus en "humanista" socio; pli konvenas senbrua eliminado. Kial uzi mallogajn procedojn, kiam ekzistas tiom da plej subtilaj rimedoj ne "konjekteblaj" de fakuloj? Konvenas kruco nur ĉe la "Tria" Tago, ĉe tempo de la "Tria Romio" post la "Tempo de la nacioj".

Alia via eraro estis kredi, ke en dudeka jarcento de l'kristanisma erao vi staris en civilizita epoko, kaj fidis bonkoremon de paŝtistoj, dum tiuj zorgis nur plej profite tondi kaj buĉi vin per "fajro kaj akvo",t.e. milito kaj paco, Kristo kaj Maria (aŭ kruco).

Tiel vi estis "ŝafide kondukita al buĉejo" konforme al Biblia profetaĵo. Se vi provis konsciiĝi pri via sorto, nur vi mem kulpas: ĉu ŝafido bezonas konscii? Kion vi diras? Merdon? Vi pravas ja! Jen la vorto-ŝlosilo senkonscie esprimita de jarcentoj per multaj nesciantoj; la "radiado Baba" de desegnitaj bendoj, kiu ŝanĝas ĉiujn estulojn en salstatuojn; la ĉiama senespera fuĝprovanto el materio; la femala "drako" indikanta pri la "maskla" ...ne forgesu: vi staras en "preparita medio".

Vi volis kompreni...ĉu vi nun komprenas tion, kio estas la vera "Virŝafa Orfelo" ? La vera "reĝa Arto" ? La vera reĝa rentabilitata afero donanta plej gravajn "royalties" (reĝajn profitojn)? Ĝi estas, tra jarmiloj, bredado, tondado kaj buĉado tuthomaraj far bonkoremaj "paŝtistoj". Vi ne diru, ke pri tio vi ne sciis;sufiĉas ja memori pri la famaj Bibliaj esprimoj tiom ripete kaj martele enŝovitaj en fidelulajn ŝafkapojn: "Paŝtu miajn ŝafojn!...paŝtu miajn ŝafinojn" kaj : "Tiam estos nur unu "Paŝtisto" kaj nur unu grego!" estas klare, ĉu ? Nur sufiĉas ĝuste kompreni: Universalismo laŭ vera (kapitalisma)senco ne estas io ajn alia,krom provado monopoligi la tuthomaran "ŝafbredadon" far ĉiaspecaj trompadoj kaj perfortadoj, inkluzive "inicadon".

Se homoj memkonsente ŝafas, pri tio ili mem kulpas,ĉu? Se, fariĝinte ŝafoj, ili provas konsciiĝi, ili des pli kulpas; kaj se, konsciiĝinte kaj ribelinte,ili fariĝas gardhundoj kaj lupoj por siaj homfratoj, ili ankoraŭ pli kulpas. Ne ekzistas elirejo; ekzistas nur malutila, plisuferiga homagitado. Homojn liberigas nek racio,nek scienco, nek konscio, nek kulturo, nek religio, nek inicado, nek filozofi- aŭ monsistemoj, nek perforta feliĉigado,nek ŝtato, nek kolektivo, nek dioj, nek idoloj, nek mesioj aŭ profetoj, sed nur individua, sekve kolektiva, homa bonvolemo mem en ĉiuj tempoj kaj sociordoj.

Tion vi ne kapablis agnoski, kvankam vi ĝin spertis kaj praktikis dum viaj militkaptitaj jaroj, kaj tial estis... feliĉa!..Ve! Kial poste vi volis profitigi viajn "homfratojn" de via propra spertado? Nenia instruado, nenia ekzemplo liberigas aŭ servutigas homojn, krom propra memvolemo. Libereco kaj servuteco estas antaŭ ĉio mensostatoj. La nura homa libereco kuŝas en memelektebleco de aparta mastro aŭ majstro, kaj ĉiuj homoj, reciproke kaj laŭ vice, estas mastroj,majstroj,klientoj aŭ servantoj unuj de aliaj en kolektivo-kadro.

Homo estas lupo por homo, kaj, en vorema lupa medio,nenio estas pli suspektenda kaj ekspluatenda ol sinceremo , fidemo kaj helpemo. Vi ĝin spertis, semis kaj rikoltis:ne forgesu la lecionon dum transpaso tra venonta "Sodom-Gomora", "panter-ursa" medio ĉe la "Tria Tago".

Kavalire en la mondon vi venis, vidis, venkis. Vi frapis al la pordo: neniu respondis. Homoj kreitaj reĝoj fariĝis servutuloj; justuloj estas mutigitaj,mortigitaj. Rapide la homhundo revenis al sia vomaĵo; rapide Nova Egiptio rekonstruiĝis, kun alta "blanka" landoparto: Usono,kaj malalta "ruĝa": Sovetio-Ĉinio, kaj inter ili "blua" Eŭropo. Necesis ja, ke okazu la skandalo; ke venu regno de l'Besto, kies nombro estas: 666,t.e.: sinergio Suno-Usono, Luno-Sovetio-Ĉinio, Tero-Eŭropo far tiu alia sinergio: hebraismo, hermetismo, kristanismo,kiu mem konsistigas la "Noa-ŝipon", la "Arkeon",kiu "flosas kaj ne mergiĝas" sur "generaciojondoj" de la lingvoj kaj popoloj naskiĝintaj el disiĝo de l'antikva "Babelo" antaŭ 166.000 jaroj, kaj celantaj al Nova "Babelo", aŭ "Siono", al "promesita lando", al "nova Socio", kie libere fluas "lakto" de kapitalisma koruptado, kaj "mielo" de religia kaj sekta brutigado.

Pacon ili deziras, sed nur novajn tutmondajn, "punikajn" militojn ili rikoltos, inter la nova Romio-Sovetio, kaj la nova Kartago-Usono. Ili manĝis fruktojn de la nuklea "vivoarbo", atingis al ĉielo kaj sin opinias dioj; tiun fojon lasu ilin sin mem detrui, ĉar polvo ili estas, kaj polvo refariĝos. Ne Dio tie kulpas ,sed nur homoj, kiuj ĉiam provas eskapi leĝojn de l'Principo, kaj sin ĵetas en riveron por eviti pluvon.

Necesas ja, ke Vivprocezo plenumiĝu, sed dependas de homa bonvolemo, ke ĝi "harmonie" malvolviĝu. Vivprocezo aperigas homojn , sed paca homa interrilatiĝado estas konsekvencaĵo de homa bonvolemo en kadro de evoluciaj leĝoj,...sed eĉ Jona-signon homo ne komprenas.

Dependas de homoj mem, ke l'homara "merkato" ne plu estu disigita de multegaj "mistikaĉoj-mistifikaĉoj" tiel, kiel l'ekonomia merkato estas disigita de diversaj "lesiv-markoj", nur submarkoj de unika "lesivfabriko" pro rentabilitateco. Ili do mem zorgu la proprajn aferojn, sen atendi helpon de nekapablaj kaj perfidemaj, pseŭdaj "superuloj", kies "supereco" kuŝas en subiĝemo de aliaj, kaj kiuj eĉ Jona-signon ne komprenas.

Same kiel la nazareta ĉarpentisto estis krucumita pro l'hipokriteco kaj la mensogoj de l'hebrea sociordo, kiu ne plu estis tiu ordonita de Moseo, tiel same vi estis ekspluatita, ŝtelita, subigita, humiligita, perfidita de ĉiuj, kaj izoligita en frenezulejo, por ke la hipokriteco, maljusteco kaj maltaŭgeco de la kristanisma, kapitalisma kaj materialisma nuna sociordo, kiu ne estas tiu signita de Kristo, klare elmontriĝu.

Per Kristo mortis la hebrea fido; per vi mortas la kristana espero...kaj jen finiĝas tiu surtera ŝimaĵo : la homaro. Kial nova homara ciklo rekomenciĝus? Kial dua "Eva-homaro"? Kial Oholiba prostituiĝado post Ohola prostituiĝado, kun ties nepraj konsekvencaĵoj: sklaveco, mortigoj, suferoj?? (°) Du jarmilionoj da vana spertado sufiĉas! La afero montriĝis senelireja; ne "rentabilitata" laŭ Dia vidpunkto estas la homaro, kiu konsistigas negravan, neatentindan erareton en la universala "detruoplano". Ĝia ekzistkialo estis reprezenti sur Tero la "bildon" de Dio; sed, pro ĝia materieco, ĝi kapablas reprezenti ja "nenion" ? Do, for la homaron! Ĝi tutsimple kaj "nature" estingiĝu! Sed se homoj pre-

(°) Jeĥezkel, ĉapitro 23.

feras perforte sin detrui, "nenio" malhelpos, ke ili tion faru: liberaj ili estis kreitaj, kaj ankaŭ rajtas ja, same kiel vi, "libere" elekti sian sorton, ĉu? Eble, tiel ili finkomprenos tion, kio estas Dio, kaj...ke individuo tiel gravas, kiel tuta homaro,sed...tro malfrue, ĉar eĉ Jona-signon ili ne komprenas.

Nun vidu: jen la loko al vi destinita kaj de vi mem "libere" ja elektita pro via obstinemo. Vi atingis al supera saĝeco, do ricevu la merititan kronon; ĉar Dia saĝeco estas frenezeco por homoj, vi do trafis la konvenan lokon. Tie vi povos ĝissate mediti kaj penti pri eraro helpi al siaj proksimuloj, anstataŭ ekspluati,ŝteli kaj murdi ilin, kiel decas en normala, moderna, homa socio,kiu eĉ Jona-signon ne plu kapablas kompreni.

Tridek jaroj restas antaŭ vi: zorge profitu kaj ĝuu ilin mia kara! Kion plu vi profitus kaj ĝuus en Nirvano?"

..........................................................

Tiel mi alvenis,fine de la dua akto, inter la kvar mole tapetitaj vandoj de frenezuleja ĉelo, kaj de tiam finsukcesis profitadi senprobleman vivon (krom la malvarmaj duŝoj) kaj ian efektivan "protektadon" de la ŝtataj instancoj for de..."l'ekstera frenezulejo", dum tempo, tempoj kaj tempoduono, konforme al la Apokalipsa profetaĵo. Plenumiĝis mia Volo! Tiel estis!

Ne daŭrigota en 2147.

o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o

En la ŝtatfilia frenezulejo Pantin
la 25an/12/1972.

Julo Ŝtrumfo.
(ĉelnumero: 417-284)

Fidele raportita de l'frenezuleja oficisto

B.G.D

---

(o)Reĝustigo de p.27. La versoj 22,23 kaj 24 devus esti:

"Al apoteoza la finkonsekvenco
De mirinde blinda la senkonscienco
De kleruloj sin taksantaj superuloj,
Kiuj mastras siajn "fratojn" sen skrupuloj."

# ĈIAM SOLA ESTAS HOMO.


o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o

Ĉiam sola estas homo dum la vivo,
De naskiĝo ĝis la morto,
Kaj ĝin helpas nek kompato,nek fiktivo
Iaspecaj kontraŭ sorto.
Ĝi suferas en solec' de l'propra haŭto,
Same kiel en karcero
Malespere dolorĝemas kondamnito
Sen rilatoj kun l'ekstero.
Reduktita al senaga truda stato,
Sonĝas ĝi pri vivofalso,
Dum febrigas, ribeligas pri la fato,
Ĝin vivforta la impulso.
Sunradio tra l'fenestro foje brilas
Kvazaŭ rido de amiko;
Najtingala fora kanto nokte trilas
Kaj ĝin lulas kun liriko;
Sed ĝi ĉiam retroviĝas same sola
Inter siaj ĉelaj muroj,
Kun spirito imagema kaj memvola,
Kun memoraj la susuroj,
Kun flugiloj ŝrumpiĝintaj de giganto,
Kvazaŭ rozo en burĝono...
Nur ĉe morto ili povos dum momento
Etendiĝi ĝis Di-trono.

o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o

En Pantin la 14an/2/1970.

B.G.D




Gérant & imprimeur: C.Baudé, F 47340 Laroque Timbaut